Valentin Thilo,

# Pretigu serioze

*tradukita de Albrecht Kronenberger*

1. Pretigu serioze
la korojn vi en vi.
Aperos grandioze
Jesu', la sav' de Di',
hero' el Dia glor',
de l' Patro promesita,
por lum' kaj viv' donita
el graco kaj favor'.

2. La korojn sen prokrasto
preparu al Jesu',
al via granda gasto.
Ne restu ŝtonoj plu.
Pretigu vin kun ĝoj'.
La montojn malaltigu,
la valojn ebenigu,
ke glatu Lia voj'.

3. Humilo kaj modero
valoras antaŭ Di'.
Aplombo kaj fiero
kondukas al neni'.
Obea justa kor'
orgojlon abomenos,
kaj pretos, kiam venon
Jesuo, la Sinjor'.

4. Jesuo, min pretigu
Vi mem, per bon' kaj ben'.
Advente apertigu
Vi min por via ven'.
Eniru do en min
de l' stalo kaj de l' kripo,
kaj koro, lango, lipo
eterne dankos vin.

. . .

Valentin Thilo,

# Mit Ernst, o Menschenkinder

1. Mit Ernst, o Menschenkinder,
das Herz in euch bestellt,
bald wird das Heil der Sünder,
der wunderstarke Held,
den Gott aus Gnad allein
der Weltzum Licht und Leben
versprochen hat zu geben,
bei allen kehren ein.

2. Bereitet doch fein tüchtig
den Weg dem großen Gast;
macht seine Steige richtig,
lasst alles, was er hasst;
macht alle Bahnen recht,
die Tal lasst sein erhöhet,
macht niedrig, was hoch stehet,
was krumm ist, gleich und schlicht.

3. Ein Herz, das Demut liebet,
bei Gott am höchsten steht;
ein Herz, das Hochmut übet,
mit Angst zugrunde geht;
ein Herz, das richtig ist
und folget Gottes Leiten,
das kann sich recht bereiten,
zu dem kommt Jesus Christ.

4. Ach mache du mich Armen
zu dieser heilgen Zeit
aus Güte und Erbarmen,
Herr Jesu, selbst bereit.
Zieh in mein Herz hinein
vom Stall und von der Krippen,
so werden Herz und Lippen
dir allzeit dankbar sein.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Mit Ernst, o Menschenkinder" de* VALENTIN THILO *(∗1607-04-19 – †1662-07-27) en Esperanton de* ALBRECHT KRONENBERGER *(∗1940-01-21) en 2012-10-07.*

*Arg-724-1459 (2012-12-23 14:25:29)*

*Tiu ĉi Esperantigo de la eklezia kanto aperis en la jaro 2012 en la n-ro 6 (897) de la dumonata kristano revuo "Dia Regno". La kanto estas kantebla laŭ la eklezia kristana kanto "Von Gott will ich nicht lassen".*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* VALENTIN THILO *(∗1607-04-19 – †1662-07-27), publikigita 1642.*

*Arg-724-1458 (2012-12-23 14:10:10)*

*Vidu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Mit_Ernst,_o_Menschenkinder`*. Pri la aŭtoro vidu:* `http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Thilo,_Valentin_(geistlicher_Dichter)` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Valentin_Thilo_der_J%C3%BCngere`*.*